# AMEBRIETO

N-ro 154

町田エスペラント会

Esperanto-klubo de Maĉida

ℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋℋ




「えほん村」にて　2016.9.11 ハケ岳合宿



2016 年９月

# 第１回町田エスペラント会合宿報告

日　時 ： ９月１０日（土）１３：３０　～　１１日（日）１２：００　１泊２日
場　所 ： 八ヶ岳エスペラント館
参加者 ： 明石、上農、木島、桐山、久場、鳥居、永木、山本、米山
講　師 ： 相田　清　氏（NPO 法人エスペラントよこはま）　　計１０人
　　　　　講演内容　「エスペラントと私」

上農副会長の司会で、La Espero 斉唱、木村会長の挨拶代読後、参加者全員がエスペラントで自己紹介及び体験報告を行った。世界大会(2 人)、ILEI 大会、ピースボートの旅 105 日間、カナダ旅行、ロシア旅行ほか盛り沢山であった。

引き続き、講師の相田 清氏から、「エスペラントと私」という内容で講演があり、エスペラントを始めたきっかけ、学習方法、エスペラントでの創作活動、海外のエスペランティストとの交流等について、さまざまな経験を聞くことができた。

講演後、写真撮影、ひだまり荘グループによるオカリナ演奏と合唱指導があった。

夕食後は、温泉"延命の湯"に行き、旅の疲れを流した。帰館後、2014 年 4 月 5 日に開催した Amuza Kunveno で、第 100 回世界大会開催地リール等について講演していただいたフランスのエスペランティスト Martine Demouy さんとスカイプで会話を楽しんだ。

夜のお楽しみ会では、講師を交えて美酒を酌み交わしながら、昔話も含め話題は尽きなかった。

翌日の 11 日（日）は、豪華な朝食後、Domo から徒歩 30 分の所にある「えほん村」を訪れ、さわやかな緑のなかでお茶を楽しみ、ゆったりした時間を過ごした。幸い 2 日間を通して、天候にも恵まれ、無事合宿を終えた。

（報告　山本）

## ・・・・・ 会長挨拶 ・・・・・

Mi tre ĝojas, ke la jam tradicia aŭtuna kunloĝado en Jatugatake ankaŭ ĉi-jare povas okazi, danke al sindona prepara laboro de koncernaj klubanoj. Precipe mi bonvenigas s-ron Aida Kiyoshi, kiu bonvolis esti nia ĉi-jara speciala gasto kaj helpi nin por nia lernprogreso. Mi certas, ke lia interesa propra sperto pri Esperanto-lernado kaj -utiligado kuraĝigos la ĉeestantojn.

Bedaŭrinde mi ne povas partopreni, sed mi esperas al vi agrablan kaj gajan kunan tempon.　　　　Kun koraj salutoj　Kimura Goro Christoph











合宿の写真はホームページでも見ることができます。[http://amebrieto.jimdo.com/](http://amebrieto.jimdo.com/)

・・・ 体験発表 ・・・・・

## Mia unutago

Akaŝi Humiko

En ĉi-somero mi havis neniun specialan raporton. Dum 2 monatoj mi pasigis ordinaran vivon. Kvankam vi enuus, mi volas raporti pri mia unutago.

Nur matene mi fartis tre bone. Mi vekiĝis antaŭ la 4a kaj aŭdis "Meznokta programo de NHK"n, kies titolo estas "Parolo al Morgaŭo". Ĉi tio estas parolo de antaŭuloj de diversaj kampoj , kaj por mi utila kaj interesa. Ekzemple s-ro Hori parolis pri Katastorofo de nord-orienta loko k.t.p. Je la 5a mi ellitiĝis kaj funkciigis lavmaŝinon kaj iris al la parko Serigaja, kie estas proksime de mia domo, kaj ludis tajĝiĉuanon (太極拳), radio-gimnastikon kun amikoj. Poste mi promenis sur pado en la parko kaj je la 7a kaj duono revenis hejmen. En julio 26 fojojn, en aŭgusto 20 fojojn mi faris ilin! Dank' al tio mi pasigis sane. Poste mi faris domlaboron ĝis la 10a kaj lernis Esperanton ĝis tagmezo (legis "Cikatro de Amo"-n, "Revuo Orienta"-n, skribis en taglibro) kaj trejnis min pri okarino en ĉiu unutago. Posttagmeze mi ripozis ĝis la 3a ( televidis, legis ĵurnalon kaj libron). Ĉirkaŭ la 3a mi iris aĉeti al vendejo unu aŭ du fojojn en semajno. En lundo ĉiutagaj uzaĵoj estis transpotitaj per konsum-Kooperativo. En vespero mi legis ĵurnalon, televidis kaj enlitiĝis je la 10a.

Mi dankas vin pro via aŭskulto.

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

## Mia somera memoro

YONEYAMA Keiko

Mi vojaĝis en Rusio dum 9 tagoj de la 29-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro en ĉi tiu jaro. Mi partoprenis en plezurvojaĝo kun s-ino Nagaki.

Troviĝas diferenco de 6 horoj inter Japanio kaj Rusio. Ĉefurbo estas Moskvo. Rusa monunuo estas rublo (signo P). 1 rublo estas ĉrkaŭ 2 enoj (1P ≒2¥).

Estis ĝuste en aŭtuno kaj malvarmete kaj agrable kiam mi vizitis. En la lasta tago pluvetis dumtempe. Sed neproblemo. La turismaj urboj estis Moskvo, Sankt-Peterburgo, Sergief-posato, Suzudaro, Uraĝimilo. Tie estas multaj Mondaj Heredaĵoj kaj tre belaj lokoj.

Sankt-Peterburgo estas la dua plej granda urbo el Rusio kaj plej populara turisma urbo en Rusio.(Tiu estis antaŭe Leningrado) En tiu loko estas Muzeo

de Ermitejo. Ĝi havas amaso da trezoroj kaj kolektaĵoj. En totalo estas pli ol 3,000,000. Tie ni havis 6 horojn por vidi ilin. Mi povis vidi vidindajn artaĵojn.

Ĉi-foja vojaĝo estis plezura kaj estas agrabla rememoro.

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

## Amuza aĉeto en Kanado

TORII Fusako

En junio mi vizitis mian nevinon, kiu loĝas en malgranda urbo de Kanado.

En ĉiu urbo de Kanado troviĝas butiko, kiu estas nomata en la angla "secondhandshop". Oni enportas senbezonan aĵon por oferaĵo, kaj povas aĉeti ion ajn tre malmultekoste. En iu butiko mi trovis tre ŝatatan tason kaj aĉetis ĝin. Mi trinkas teon per ĝi ĉiutage. Ĝi kostis 20 enojn. Kaj ĉi tiu ĉemizo kostis 640 enojn kaj ĉi tiu koliero kostis 80 enojn. De antaŭe mi deziras, ke simila butiko estu en mia urbo, sed ne. Mi envias kanadanon.

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

## Lastatempa stato

KIZIMA Kenĵi

Mi finis laboron por kompanio en marto, kiu daŭris dum 50 jaroj. Post tiam mia sango-premo 20 gradojn malaltiĝis. Tion mi anoncis al mia kuracisto fiele, tiam li diris, ke iom da streso necesas por via pli maljuna tempo. Kaj en semajnotago mi ne bezonas atendi longe, ekzemple en oficejo, urbodomo, hospitalo. Krome mi povas mem antaŭdecidi mian tutan tagon. Resume mi bedaŭras, ke mi ne eksiĝis de mia laboro pli 10 jarojn frue.

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

## Mia raporteto

Yamamoto Misato

Mi ĉeestis la duafojan kunvenon de samrondanoj de Hiroŝima Rondo Harmonia (RH). Ĝi okazis la 20an de aŭgusto en la urbo Hiroŝimo. La ĉeestantoj nombris 23, multaj el kiuj estis relative junaj. Mi estis la unua el tiuj, kiuj aliĝis al la RH.

Mi estis tre ĝoja, ke mi renkontiĝis kun kelkaj posteuloj en la sama kolegio 40 jarojn post la diplomiĝo. Ni ĝuis fotojn de malnovaj albumoj kaj kantojn kantitajn en tiu tempo.

Mi komprenas, ke estas malfacile reveni al Esperantujo tre baldaŭ por plejparto de la ĉeestantoj, kiuj ankoraŭ havas sian propran laboron. Sed mi tamen deziras, ke ili nepre revenu en ĝin, kiam ili trovos liberan tempon en sia vivo. La Esperantujo ja atendas ilin.

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

## Ĉirkaŭnavigada vojaĝo de Paca Boato dum 105 tagoj

( 2015.12.17 ～ 2016.3.30) Manjo

Pri mia vojaĝo mi jam raportis sur la antaŭlasta numero de "AMEBRIETO". Do hodiaŭ mi volas prezenti ĝin kun fotoj. (※ Pro manko de spaco la fotoj ne estas aperigitaj sur ĉi tiu paĝo.)

Dum la vojaĝo en ĉiu lando oni proponis kelkajn turismajn vojaĝojn.

**<Azio>** En Amoj en Ĉinio, Danango en Vjetnamio kaj Singapuro mi vizitis vidindejojn per buso. Poste la ŝipo navigis tra Hinda oceano kaj survoje transiris ekvatoron. En la suda hemisfero mi vidis stelan konstelacion "Suda Kruco".

**<Madagaskaro >** Poste ni vizitis kelkajn insulojn. El ili la plej granda estas Madagaskaro. De havenurbo mi flugis al okcidenta parto de Madagaskaro. En vasta kampo nur baobaboj alte staras. Onidire ili vivas kelkcentjarojn. Baobaboj estas tre strangaj formoj. Oni esprimas, ke la diablo eltiris la arbon kaj enpuŝis ĝin renverse en la teron. En kampo knaboj vigle kuris, kvankam iliaj vivoj estas malriĉaj. Laŭ Mond-banko ĉirkaŭ 90 % da loĝantoj devas vivi per malpli ol 2 dolaroj por unu tago en Madagaskaro.

**<Afriko>** Poste mi alteriĝis sur Afrikan kontinenton. De Maputo en Mozanbiko mi veturis per buso kaj aviadilo al Nacia Parko Kruger kaj Viktoria Akvofalo kaj Bonespera Kabo en Sud-Afriko. Poste la ŝipo navigis al Walvis Bay en Namibio kiu situas la okcidenta marbordo de Afriko.

**<Nacia Parko Kruger>** Nacia Parko Kruger estas unu el la plej grandaj ĉasrezervoj en Afriko. Ĝi kovras 19,485 $km^2$. Pli granda ol Ŝikoku en Japanio. En la parko ni spertis ĉasadon per aŭto. Kompreneble nur observis bestojn. La parko havas multe da specioj de bestoj. Ĉi tie ĉiuj el la Granda kvinopo estas troviĝantaj; nome leono, leopardo, afrika elefanto, afrika bubalo kaj rinocero. Mi vidis impalojn tiel multe kiel mi perdis intereson pri ĝi. Kaj mi ofte vidis elefantojn, zebrojn kaj ĝirafojn. Kaj tre

malofte leonojn kaj nur unu fojon du leopardojn　Tute bonŝance.

**< Viktoria Akvofalo>**　Viktoria Akvofalo situas laŭlonge de la rivero Zambezi sur la limo de Zambio kaj Zimbabvo kaj estas proksimume 1,7 km larĝa kaj 128 m alta. Ĝi estas unu el tri kataraktoj de la mondo. La alteco estas la unua el ili.

**<Sud-Ameriko>**　Jen estas la statuo Kristo la Savinto sur la monteto Korkovado. Dank`al Olimpikoj ĉi tiu statuo famiĝis. Mi propraokule vidis ĝin. Dum 4 tagoj la ŝipo haltis en Rio-de-Ĵanejro en Brazilo. Tie mi ĝuis ankaŭ karnavalon, kiu estas unu el la plej grandaj festoj de la mondo. Poste la ŝipo navigis al Montevideo en Urugvajo, Buenos-Ajreso, Ushuaia en Argentino kaj Valparaiso en Ĉilio. Survoje mi forlasis la ŝipon por viziti al Igvasuo dum 5 tagoj kaj Maĉupikĉuo dum 6 tagoj.



**<Igvasuo>**　Igvasuo estas granda akvofalo situanta je 80% en Argentino kaj je 20% en Brazilo. Ĝi altas 72 metrojn kaj havas 150–300 falojn.　Ĝi estas Monda Naturheredaĵo de Unesko. Mi ĝuis la tutan panoramon de la grandioza spektaklo de la brazila kaj argentina teritorioj. Ni proksimiĝis al baseno sub akvofalo per boato. Tiam mi malfacile spiris kvazaŭ mi estus en ŝtormo. Komprenebre ni estis plene malsekaj sed ĉiuj kontente ridis.

**< Kusko kaj Maĉupikĉuo>**　Maĉupikĉuo estas la plej grava arkeologia loko, kiu en Peruo restis post la inkaa imperio. Unue mi flugis de la ĉefurbo de Peruo Limo al Kusko, kiu estas la plej antikva urbo de la kontinento, kiu estis senĉese loĝata. Ĝi situas en 3399 metrojn alta. Tiu alteco egaras al 1a 9a stadio de la monto Fuĵi. Pro alteco nia akompanantino estis atakita de montara malsano. La loĝantoj estas plejmulte indianoj. Eĉ knabinetoj laboras por gajni 1 dolaron kontraŭ turistoj.

**< Fjordo>**　La sezonoj de landoj en la suda hemisfero estas malaj al tiuj de Japanio en la norda hemisfero. Dum la vojaĝo preskaŭ ĉiuj lokoj estis en somero. Sed Ushuaia en Argentino estas la plej suda urbo de la mondo, kiu situas proksime de Suda Poluso. La ŝipo navigis en la Beagle kanalo kaj ni ĝuis Patagonian Fjordon, kie estas konstanta amaso da glacio. Ni ĝuis la

pejzaĝon, kiun nur ŝipvojaĝantoj povas vidi.

< Insuloj>　De Valparaiso en Ĉilio la ŝipo navigis en suda Pacifika Oceano. Ni vizitis 3 insulojn, Paska Insulo (japane: イースター島) en Ĉilio, Papeeto (Tahitio), Bora Bora insulo en Franca Polinezio, Majuro en Marŝala Insularo.

<Eventoj>　En la ŝipo laŭsezonaj eventoj okazis; Kristonasko, Novjara tago, Sportfesto,k.t.p.

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

・・・ ゲストからのメッセージ　・・・・・

Invitite de via klubo mi havis ĝojan tempon en la Esperanto-Seminario en Jatugatake. Mi elkore dankas vin pro via aŭskultantoj de mia prelego ne sufiĉe aranĝita. Ne nur interŝanĝo de opinioj sed ankaŭ noktodistraĵoj de babilado, muziko k.a. estis interesaj.

Dezirante al vi pli multe da sukceso ankaŭ en la agado de estonteco.

Amike Via　AIDA Kiyoshi

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

お　知　ら　せ

土曜日の学習会は、10 月 22 日は生涯学習まつりのためお休みします。

**編集後記**

☆　今号は八ケ岳合宿の報告特集になりました。世界大会に参加したお二人の報告は紙面の都合で次号に掲載させていただきます。ご了承ください。なお、ホームページにも合宿の報告を掲載しています。きれいな写真を見ることができますので覗いてみてください。(M)

☆　次号の発行は 11 月の予定です。

AMEBRIETO 2016 年 9 月 23 日発行 第 154 号　編集・発行　町田エスペラント会編集部